

Aarhus Esperanto-klubo

Jarraporto 2022

2022 estis bona kaj aktiva jaro. Nia kunvenloko ĉi-jare restis Folkestedet, Carl Blochs Gade 28, 8000 Aarhus C. Ni ne plu estis tiel ĝenataj de la koronaviruso, do tio faciligis aferojn. Ne multe nova okazis en la klubo, ni daŭrigis niajn monatajn kunvenojn.

En januaro ne estis klubkunveno. En februaro ni havis nian Ĝeneralan Kunvenon. Svend kaj Marie reelektiĝis kiel estraranoj kaj Tobias kiel prezidanto.

En marto Tobias gvidis ludojn en Esperanto.

En aprilo Erik kaj Grethe rakontis pri testudoj kaj ilia propra testudo, kiu havas sian propran spacon la ĝardeno. Ĉarma!

Anders en majo prelegis pri Tokipono, kio estas konstruita lingvo pli simpla ol Esperanto. Estis bona enkonduko por la lingvo.

Ĉi-jare ni okazigis someran ekskurson al Silkeborg. Ĉi tie ni vizitis la Asger Jorn Muzeon, kiu estis fakte tre ampleksa. Poste ni tagmanĝis en Indelukket apude. Fine, ni iris al la urba haveno, por enŝipiĝi sur iu el la malnovaj riverŝipoj kaj ĝuis vojaĝon sur Gudenåen. Fine ni havis kafon, teon kaj kukon denove en la muzeo je ties kafejo. Venontfoje mi prizorgos ankaŭ veganajn eblojn. Entute sukcesa tago.

En septembro ni renkontiĝis kaj rakontis pri niaj someraj travivaĵoj. Mi montris bildojn de mi biciklokaravano al IJK kaj Eckhard montris bildojn de vojaĝo al Britio. Ankaŭ aliaj kontribuis.

Por la oktobra kunveno Eckhard venis kaj parolis pri lingvo.info, kio estas internacia projekto pri lingvoj en kiu li partoprenis. La retejo vizitindas.

En la lasta momento ni perdis nian programeron por la novembra kunveno, sed denove Eckhard savis nin. Ni kunportis ludojn, sed la ludoj de Eckhard estis plej kuriozaj kaj provindaj. Memfarita kaj de antaŭa jarmilo. Do ni ludis tian kvizludon.

Ĉi-jare ni finfine sukcesis okazigi nian decembra kristnask- kaj zamenhof-festan kunvenon, kio estis plezuro. Ni kantis, regaliĝis je rakonto, manĝis kukojn kaj ĉio je la animo de Kristnasko kaj memore de Zamenhof.

Dankon al la membroj por bona jaro kaj mi deziras al vi eĉ pli bonan 2023. Mi atendas novajn membrojn en tiu jaro!

Tobias Svangtun Nowak, nome de la estraro
januaro 2022